

## Congreso de Almagro:

Ni volas anonci al vi ke la Estraro de Hispana Esperanto-Asocio decidis ke la 71-a Hispana Kongreso de Esperanto, okazos inter la 27-a de aprilo kaj la 1-a de majo de 2012 en la urbo Almagro, laŭ invito de Esperantista Kastili-Manĉa Asocio.

Ni antaŭvidas ankaŭ ke modesta turisma postkongreso okazos la 2-an de majo, por homoj kiuj povos ĝin ĉeesti.

La kongreso havos kiel kadron la celebron en 2012 de la 125-a datreveno de la publikigo de la Unua Libro, kie Esperanto mem estis prezentita. Ĝi povas taŭgi kiel grava ero de la celebradoj kiuj havos lokon en diversaj partoj de la mondo, kaj al kiuj ankaŭ HEF volas kontribui. Dum venontaj semajnoj ni informos al vi pri la projekto kiun ni nun pretigas, kaj al kiu ĉiu ano de HEF kaj ĉiu aktiva esperantisto estas invitata kontribui.

Ne mankos en la programo kulturaj, distraj kaj turismaj aktivadoj. Almagro estas konata kiel la ĉefurbo de la Teatro, danke al sia mondkonata Corral de Comedias, kaj la teatro nepre trovos sian lokon en la programo. Ni ankaŭ troviĝos en la tero de Donkiĥoto, kaj certe tiu figuro iel rolos en nia kongreso. Krome, dum venonta jaro ni kunmemoros la 20-an datrevenon de la firmiĝo de la Ibera Skolo de esperantaj verkistoj, kaj ni kalkulos je la ĉeesto de kelkaj figuroj el tiu elstara pinto de la kulturo en nia lingvo.

Ĉio ĉi estas nur frandaĵo. Ĉiukaze, la programo ankoraŭ ne estas tute fiksita, kaj ni invitas vin mem kontribui al ĝi, per viaj ideoj kaj kunlaboremo. Ne hezitu kontakti la lokan komitaton por tiu celo.

En apuda folio vi trovos la unuajn informojn pri la Kongreso. Pluajn detalojn ni sendos en venontaj numeroj de Boletín, kaj se necese en apartaj informiloj.

Fine, memoru ke dum venonta jaro oni laŭstatute devas renovigi la Estraron de HEF. Ni anoncos kun sufiĉa tempo al la anoj la okazigon de la Ĝenerala Kunveno de la asocio, preskaŭ certe sine de la anoncita kongreso, sed estus tre konvene ke ĉiuj anoj kaj simpatiantoj komencu pripensi siajn ideojn kaj kontribuojn por la estonto de la Asocio. La nunaj estraranoj volonte atentos viajn ideojn, planojn, projektojn kaj kandidatiĝojn, se vi tion deziras.

Kun invito al via aliĝo kaj partopreno en nia Kongreso, amike samideane salutas vin,

José Antonio del Barrio

Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio



Jaro 10 - Numero 25

Novembro 2011

## ZAMENHOF-Tago

La comida con la que anualmente recordamos el día del nacimiento del iniciador del Esperanto, Dr. Zamenhof tendrá lugar el próximo día 17 de diciembre a las 14 horas, en el Restaurante Rochí, sito en calle Florida, 15. Precio: 17 euros. Te has apuntado ya a esta comida? Confirma en: ☎ **676-27-50-60**

4 3 3 7 7

Los que aun no tenéis lotería de la Asociación, y queráis conseguirla, decidlo ya, ¡pero ya! ¡Hoy mismo! ¿Qué cantidad te reservamos? Llama: ☎ **676-27-50-60**

Aprovecha la última oportunidad. Adquiere alguna de las últimas participaciones de nuestro número de la Lotería de Navidad. Ayudas a la Asociación y puedes soñar en ganar dinero con ella(s).

### Agadoj

Laŭ planite, ni ekskursis al Ribadesella kaj Lastres (Miguel ĉiĉeronis montrante al ni la lokojn de konata televidserio "Doktoro Mateo").

Belaj lokoj de Liébana-valo estis celo de nia novembra ekskurso, inter tiuj Piasca monaĥejo kaj, fine, promenado tra Potes,

Ja, ni varme sugestas al niaj legantoj partopreni niajn ekskursojn. Ili utilas por amikumi, ĝui belajn pejzaĝojn, manĝi en agrabla etoso...

### ASOCIACIÓN CÁNTABRA DE ESPERANTO

ret-adreso: Cantabria@esperanto.es

Banka konto ĉe CAJA RURAL DE BURGOS:

3060 - 0071 - 84 - 2135122212

✉ Apartado de Correos 2.240. 39080 SANTANDER (Cantabria)

☎ 676 - 27 50 60

NIF: G39077201

Cuota Anual: 15 €

## Saluton numero 25

Dum lastaj dek jaroj la *Asociación Cántabra de Esperanto* pretigis ligilon kiu nun atingas ĝian 25-an numeron. Ni havis ideojn por tiu numero, kiu iel jubileus tian atingon. Tamen, ja nun ĝi devas aperi pli urĝe ol kutime. Nu, ni estas en la 27-a jaro de nia asocio kaj, kvankam ne regule, ni sukcesas sendi ligilon kun la celo ke ĉiu estu informata pri entreprenitaj agadoj. Tiu estas nia celo, nia nura celo. Tamen, ni klopodas en la limo de nia paĝoj, aldoni kelkfoje artikolojn pri movadaj aferoj. Dum tiuj 27 jaroj nur du personoj estis ĉiam respondecaj estraranoj: Miguel Gutiérrez kaj Pedro Ullate. Tial, ni rajtas opinii ke ĝisnuna agadpolitiko spegulas iliajn ideojn pri asocia funkciado kaj disvastigo de Esperanto. Kaj ni dankas al tiuj la nunan ekziston de nia Asocio, sen forgesi aliajn homojn kiuj ag(i-a)s en la estraro, plej grave Juan Antonio Madrazo, nia unua prezidanto. Rikolto estas la rezulto de semo en plugita kampo, kun aliaj faktoroj foje favoraj, foje esterilaj. Ĉia kaze, nia nuna prezidanto, la dua asocia prezidanto, meritas elstarigon pro tiom da streboj por Esperanto. Ja, li nun estas elstara aganto por Esperanto kaj la Asocio eblas profiti tiun ŝancon.

Laŭ *Internet*, Miguel Gutiérrez naskiĝis en 1950 en Kantabrio. Li estas kemia inĝeniero kaj lernis Esperanton 19-jara. Li estis vicprezidanto de Hispana Esperanto Junulara Sekcio kaj redaktoro de ĝia bulteno, ankaŭ estrarano de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kaj redaktoro de ĝia revuo *Kontakto*; direktoro de Fundación Esperanto... Li eldon(i-a)s la scienc-fikciajn seriojn *Sferoj*, *Orbito nula* kaj *Future*, kaj diversajn verkojn de aliaj aŭtoroj pri aŭ en Esperanto. Ĝis 2005 li estis redaktoro de la organo de Hispana Esperanto-Federacio *Boletín*. Li kunlaboris kaj kunlaboras en pluraj revuoj, ekzemple en *Monato* kaj *Literatura Foiro*, kaj gajnis premiojn en literaturaj konkursoj. Li verkis lernolibron por hispanlingvanoj kaj vortaron esperantan-hispanan kaj hispanan-esperantan. Plumnomoj: Liven Dek, Maria Zocato, Svena Dun kaj aliaj. Akademiano. Nun, kiel ni diris en antaŭa *Saluton*, li estas vicprezidanto de Hispana Esperanto-Federacio. Li tradukis en esperanton *La stultaj infanoj* (Ana María Matute) kaj *Platero kaj mi* (Juan Ramón Jiménez). Krome, li kunlaboris per tradukoj de Armando Palacio Valdés por *Astura Bukedo* kaj *La sekreta miraklo* (Jorge Luis Borges: *La viro ĉe la sojlo*). Li partoprenis plurajn verkojn kiel *Ibere libere*, *Ekstretoj* kaj aliaj. Ja, li havas en esperanto gravan verkan laboron tiel originale kiel traduke. Lastatempe, li ankaŭ okupiĝas en aranĝado de filmoj kaj videoj kiujn li aperigas sur retaj kanaloj; li aranĝas, filmas, reĝisoras, komentas, intervjuas... Li ankaŭ agis sur la kanzona kampo tiel per tradukoj kiel per rekta interpreto.

## YOUTUBE-Kanalo

En Youtube-kanalo zorgata de nia prezidanto vi povas trovi liajn lastajn eldonaĵojn, inter tiuj: “Ĝis revido!”, unu el la unuaj kantoj de Solo (nun Solotronik, pseŭdonimo de malaga esperantisto); la kanto apartenas al la disko “La kosmo-infano”, kiu aperis en 1989.

## Opinioj

Kunlaboro signifas konsenton por ke pluraj personoj agu laŭ difinita kaj, plej grave, interkonsentita senco. Komununa konsento ne signifas ke unu proponas kaj la aliaj nepre devas akcepti tion. Esperanto estas, por la plimulto, hobbio, ne laboro. Tial, ŝparu tempon per demokratia ago kaj ne klopodu trudi laboron. Eraro estas kalkuli je la fortoj de aliaj por ke tiuj faru/agu laŭ nia volo.

## La unua Esperanta Kinofestivalo

De la 10-a ĝis la 13-a de julio 2011 en San-Paulo, Brazilio okazis la unua Esperanta Kinofestivalo enkadre de Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE). Por la festivalo estis alsenditaj 21 videaj el 13 landoj en tri kategorioj: 5-, 15- kaj 30-sekundaj filmoj.

Pri la 1<sup>a</sup> Esperanta Kinofestivalo "Kino sen limoj" Rogener Pavinski finmuntis nun belan video-raportaĵon.

Ni invitas vin spekti ĝin. Se ĝi plaĉas al vi, bv. diskonigi ĝin. Per tio ni

kreos komunumon, kiu kontribuos al la sekva kinofestivalo.

Aleksander Osincev, organizulo kaj motoro de la Esperanta Kinofestivalo pretigis analizan raporton pri la tuta aranĝo. Ĝi estas trovebla ĉe [http://vikio.filmoj.com/\\_media/wiki:analiza\\_raporto\\_14.09.pdf](http://vikio.filmoj.com/_media/wiki:analiza_raporto_14.09.pdf)

La dokumento donas detalan raporton pri la evento, rakontas pri la sukcesaj kaj malsukcesaj partoj, analizas ilin por perfektigi la organizadon de la sekvaj tiaspecaj eventoj kaj helpi eviti grandajn problemojn, donas konkretajn informojn pri la buĝeto kaj kolektas konkludojn.

La profesia metodo pretigi postfestivalan resuman raporton, kaj ĉefe ĝia stilo kaj enhavo povas servi kiel modelo por multaj organizantoj de Esperantaj renkontiĝoj kaj projektoj...

La raporto inkluzivas ankaŭ rezultojn de enketado de spektantoj.

Szilvási László

